p. 167, n-ro 43. ***A. punctiformis*** Ach. anstataŭ "Sporoj (13-16 x 4-8 µm) ovoidaj", legi : "Sporoj (13-26 x 4-8 µm) ovoidaj aŭ oblongaj". Antaŭ "Tre disvastiĝinta", aldoni : "f. ***punctiformis*** kun sporoj 15-26 x 6-8 µm; f. ***oleandri*** (Rabenh.) Redgr. kun sporoj 13-17 x 4-6 µm".

p. 168, n-ro 50. ***A. fuliginosa*** (Turn. et Borr.) Flot. ekzistas ankaŭ en S-Hispanio.

Arthopyrenia

p. 169, n-ro 8. ***A. monensis*** (Wehld.) Zahlbr. Modifi jene : . — Anglio. Sur mortero de muro k humidaj ŝtonoj —

p. 170, § 2, 33, 444. Anstataŭ "prekaŭ", legi "preskaŭ".

Arthrorhaphis

p. 174, n-ro 1. Anstataŭ "*fueistingii*", legi : "*fuistingii*".

Aspicilia

p. 175, aldoni 2 speciojn, facile rekoneblajn pro talo ± arbedeca, kun ± rondaj pseŭdocifeloj blanketaj, iafaje klasifikitajn en aparta genro (*Sphaerothallia* Nees ex Eversm.) tre afina al *Aspicilia* gr. *calcareae*, konatajn en U-Eŭropo nur en sekegaj regionoj de Hispanio, inter 1000 k 1400 m.

A. fruticulosa (Eversm.) Flag., kun talo en formo de kuseneto (0,8-3,5 mm) ruste aŭ verdaĉe bruna, ne fiksita al la substrato (grundo), pervente movebla, tre mallonge k tre dense branĉa, ĉiu branĉo aspektanta kiel tubera skvameto kun po unu aŭ pluraj pseŭdocifeloj [0,1-0,5(0,9) mm] blanketaj, ± rondaj. Apotecioj (1-4 mm) tre maloftaj, nigradiskaj. Sporoj (20-25 x 17-20 µm) 3-4-opaj.

A.(?) hispida Mereschk., kun talo okrete bruna, unue fiksita al la substrato (surgrundaj ŝtonetoj) sed malfiksita k poste libera k pervente movebla, tipe arbedeca (1-3,5 cm alta); branĉoj ± rondsekcataj (0,4-1 mm), ĉefine pintaj, kun loklokaj pseŭdocifeloj (0,1-0,4 mm). Apotecioj nekonataj k sekve aparteneco al la genro necerta.

p. 177, § 22, 3. Modifi jene :

3 Talo sorala, ne lobĉirkaŭa, K+ (flava, poste ruĝa), P+ (flava).

44 Soraloj (0,2-0,8 mm) farunecaj, ebensupraĵaj, blanketaj... **6a. *A. grisea*** Arnold

4 Soraloj (0,3-1 mm) malfajne granulaj, izidi-aspektaj, okre flavetaj ĝis nigre grizaj, rondaj ĝis neregulformaj. Sporoj 16-22 x 9-11 μ m. — Finnio, Germanio, Aŭstrio. Monta k subalpa etaĝoj. Nekalkeja, elmeteja, suneja. — Sin. *Lecanora isidiata* H. Magn., *L. bahusiensis* H. Magn. — **6b. A. simoensis** Räs.

p. 177, § 2, 33, 44, 555. Modifi jene :

555 Surlignaj.

66 Sporoj (10-20 x 6-13 μ m) ...

—> **26. A. lignicola**

6 Sporoj (17-26 x 6-13 μ m). Piknidiosporoj nekonataj. Talo fendet-areola, verdete cindre aŭ bluete griza. Apotecioj (0,2-0,5 mm) nigraj, senprujnumaj, sen distingebla tala randaĵo. Epitecio brunete ĝis malhele verda, tre N+ (smeralde verda). — Finnio k Germanio (Badio). Monta etaĝo — **6c. A. lignaria** H. Magn.

p. 178, n-ro 13. Aldoni : **Rim. A. subradiascens** (Nyl.) Hue, el N-Eŭropo (inkl. Skandinavion), kun sporoj 17-23 x 8-11 μ m, piknidiosporoj 16-25 x 1 μ m k talo malhele griza, kun stikta acido, eble sinonimas (prioritate!) al 13. *A. verrucigera* Hue.

p. 181, § 5. Modifi jene :

666 = 66 ...

22. Aspicilia calcarea

66 = 6 ...

23a. A. contorta

6 Talo malfajne granula, malhelele grizbruna, K-, el granuloj duonglobaj (0,2-0,8 mm), oftete mallarĝabazaj, kuntuŝaj, iafoje interproksimaj, ĉe la talĉirkaŭo disaj sur brune griza hipotalo iafoje bone videbla. Apotecioj (0,5-1,4 mm) ofte malestaj, ne krateroformaj, fruevolue lekanorecaj, elstaraj, mallarĝabazaj, kun disko nigreta sed ofte grizaprujnoma, k randaĵo dika, samkolora al la talo. Sporoj 17-28 x 12-26 μ m, 4(8)-opaj. — S-Anglio. Sur silikaj ŝtonetoj —

23b. A. tuberculosa (Ach.) Laund.

p. 184, post §4, 5. Aldoni (antaŭ 66) :

666 Talo sorala, el skvametoj (0,5-1 mm) grizaj, brunverdetaj aŭ brunaj, blanke prujnumaj, kies rando naskas 1-3 soralojn, nigr(et)ajn, kaviĝantajn, el soraleroj 18-24 μ m diametraj. Maturaj apotecioj nekonataj. — Aŭstrio, Finnio k Skandinavio. Sur kalkaj rokoj, malnovaj muroj k mortero. Suneja —

32a. Aspicilia excavata Thor et Timdal

Bacidia

p. 189, § 55, 6, 7 k § 5, 666. Anstataŭ "15. *B. fusca*", legi : "16. *B. fusca*".

Antaŭ § 777, aldoni :

7777 Sporoj (12-23 x 1 μ m) nadloformaj, fajne 3-septaj. Epitecio k hipotecio senkoloraj. Apotecioj (0,2-0,5 mm) blanketaj. Talo verdete griza. — Korsikio k Hispanio —

9a. B. subchlorotica (Nyl.) Flag.

p. 190, n-ro 12. Anstataŭ "**B. buxi** Vèzda et Vivant", legi "**Fellhanera buxi** (Vèzda et Vivant) Vèzda".

p. 191, antaŭ 777, aldoni :

7777 Surfolia (ĉefe sur *Buxus*). Talo maldika, kontinua, malbrila, sen videbla hipotalo. Apotecioj (0,2-0,5 mm) ĝenerale malmultaj, hele flavetbrunaj, surtalaj, mallarĝabazaj, unue ebendiskaj k maldikrandaĵaj, poste konveksaj k senrandaĵaj. Himenio 40-50 μ m alta. Parafizoj malmultaj, kun supro ne tre dikiĝinta. Sporoj (16-25 x 2-3 μ m) 5-7(9)-septaj. — SU-Francio —

18a. B. colchica Vèzda

p. 192, legendo de fig. 136. Anstataŭ "(47)", legi : "(48)".

p. 193, § 4, 555, 6, 77. Modifi jene :

77 Apotecioj 0,2-0,6 mm. Sporoj 20-45 x 1-2 µm.

88 Sur-ŝela, pli malofte -leda aŭ -defalaĵa...

28a. *B. phacodes* Körb.

8 Folioloĝaj (ĉefe sur bukso). — SU-Francio —

99 Talo granul(et)a aŭ ne tre videbla. Sporoj 28-38 x 1-2 µm.

28b. *B. apiahica* (Müll. Arg.) Zahlbr.

9 Talo koraloida, bone videbla. Sporoj 35-45 x 1-2 µm.

28c. *B. vasakii* Vězda

n-ro 32. *B. killiasii*. Anstataŭ "(Hepp) Oliv.", legi "(Hepp) Hawksw.

p. 196, post n-ro 50, aldoni : Rim. : *B. vivanii* Vězda, el Francaj U-Pireneoj, sur ŝelo de maljuna falfolia *Quercus*, diferencas de 50. *B. polychroa* pro epitecio blue verda, sporoj pli malgrandaj (38-45 x 3 µm) k apotecioj pli grandaj (0,5-2 mm).

n-ro 51. *B. propinqua* (Hepp) Arnold ekzistas ankaŭ en Katalunio.

Bellemeria

p. 198, n-ro 1. Anstataŭ "*Aspicilia*" *myrini*, legi "*Aspicilia*" *myrinii*.

§ 1. Aldoni : "Montaroj k malvarmaj regionoj."

Belonia

p. 202, n-ro 4. *Belonia incarnata* Th. Fr. et Graewe ex Th. Fr.. Aldoni : Alpoj (de Aŭstrio k Italio).

Biatorella

p. 205, n-ro 9. *B. monasteriensis* (Lahm) Lahm ekzistas ankaŭ en SE-Francio (Var, insulo Port-Cros).

n-ro 10. *B. tirolensis* H. Magn. ekzistas ankaŭ en Skandinavio.

Buellia s.l.

La determinilo pri la nelikeniĝintaj likenloĝaj *Buellia* s.l. estas nekompleta, i.a. koncerne *Abrothallus* k *Dactylospora*. Nova determinilo aperos en verkata libro : "Nelikeniĝintaj fungoj likenloĝaj".

p. 211, n-ro 15. *Buellia badia* (Fr.) Massal. estas iafoje senpere surpetra aŭ malofte (laŭ HOUMEAU, letere) surmuska.

§ 4, 55, 6. Aldoni :

777 Sur taloj de *Lecanoraceae* en Alpoj. Talo K+ (flava, poste ruĝa), hele aŭ brunete griza. Askofruktoj (0,3-0,4 mm) ne aŭ ne tre elstaraj, ebendiskaj, kun randajo maldika sed daŭra. Epitecio bluete nigra; eksciplo supraparte bluete nigra sed aliparte ju pli proksima al hipotecio des pli helkolora; hipotecio k himenio (45-55 µm alta) senkoloraj. Sporoj (9-12 x 5-8 µm) ĉesepte ne maldikiĝintaj, proks. egalĉelaj. — Malbone konata specio —

Buellia leptolepis Bagl. et Car.

p. 213, n-ro 39. *Buellia ericina* (Nyl.) Jatta. Modifi jene : "... Talo pulvoreca ĝis fendet-areola... — Portugalio, Katalunio k Korsikio —

p. 215, n-ro 51. *Buellia verruculosa*. Modifi jene :

... Sin. *B. verruculosa* auct. non (Sm.) Mudd —

51. *B. ocellata* (Flot.) Körb.

n-ro 55. *B. aethalea*. (Ach.) Th. Fr. Aldoni sinonimon : *B. verruculosa* (Sm.) Mudd non auct.

p. 216, n-ro 60. *B. vilis* Th. Fr., aldoni : "Sporoj 12-18 x 6-9 µm".

p. 221, n-ro 100. *Buellia glaucoatra* (Nyl.) Clauz. ekzistas ankaŭ en S-Hispanio.

Byssoloma

p. 221, n-ro 1. *Byssoloma leucoblepharum* (Nyl.) Vain. em. R. Sant. ekzistas ankaŭ en Italio.

Calicium

Pro la grava revizio de TIBELL (1984), ni tute reverkis la determinilojn pri la genroj *Calicium*, *Chaenothecopsis*, *Phaeocalicium* k *Mycocalicium*. En ĉi tiu suplemento, *Calicium* estas pritaktita sole, dum la tri aliaj genroj kune (v. *Chaenothecopsis* s.l.).

111 Sur *Poaceae* (= graminacoj). Apotecioj nigraj, kun pedunklo tre mallonga (0,1 mm) k kapo (0,2-0,6 mm) $\pm$ globa aŭ plata. Sporoj 6-8 x 3 μ m. — N-Italio. — Malbone konata; eble apartenas al *Chaenothecopsis* — 1. *C. culmigenum* De Not. et Bagl.

11 Sur nekalkaj rokaj subkorbaloj. — Mez- k N-Eŭropo —

22 Sporoj 4-10 x 2-4 μ m. Apotecioj tre malgrandaj, senprujnumaj, kun pedunklo hele bruna ĝis nigra k kapo nigra, globa aŭ turboforma. Sen videbla talo. — Sur *Chaenotheca furfuracea*. — Malbone konata specio; eble apartenas al *Chaenothecopsis* — 2. "*Caliciella*" *parasitica* Räs.

2 Sporoj (12-15 x 4-5 μ m) kun supraĵo malglata k fendeta. Pedunklo 0,3-0,5 mm longa; kapo (0,2-0,5 mm) turboforma, subaparte fajne k blanketgrize prujnuma. Talo granula aŭ pulvorea, flavete verda, $\pm$ distingebla. — Preskaŭ ĉiam sur aliaj krustecaj likenoj ĝenerale senfruktaj — 3. *C. corynellum* Ach.

1 Sur ligno k ŝelo (aŭ sur likeno ŝelloĝa).

22 Likenloĝa : sur senfrukta talo blanketa, sur *Quercus* en insulo Jerzejo (Jersey). Pedunklo nula aŭ tre mallonga. Sporoj 8-11 x 2-5 μ m. Specio tre malbone konata; verŝajne apartenas al *Chaenothecopsis* — 4. *C. retinens* Nyl.

2 Ne likenloĝaj.

333 Apotecioj dike k blanke prujnumaj, kun pedunklo ĉ. 1 mm longa k kapo lento- aŭ turbo-forma. Sporoj 8-12 x 2-4 μ m. — Mez- k N-Eŭropo. — Laŭ SANTESSON (1984), sinonima al *Chaenothecopsis debilis* — 5. *C. norvegicum* Vain. ex Hav.

33 Apotecioj flave prujnumaj. Eksciplo k pedunklo permikroskope J-.

44 Talo P+ k K+ (flava, poste ruĝa), granula, griza. Pedunklo bruna, 0,5-1 mm longa; kapo (0,3-1 mm) $\pm$ globa. Sporoj (13-16 x 5-7 μ m) kun supraĵo ornamita de spiralaj ripoj ne tre elstaraj. — Mezeŭropo k S de N-Eŭropo —

6. *C. adpersum* Pers.

4 Talo P-, K-, ensubstrata, ne tre distingebla. Pedunklo nigra, 0,5-0,8 mm longa; kapo (0,2-0,5 mm) lentoforma. Sporoj (10-11 x 5-6 μ m) kun supraĵo fendega. — Mez- k N-Eŭropo; Katalunio —

7. *C. trabinellum* Ach.

3 Apotecioj senprujnumaj aŭ malabunde k blanke prujnumaj.

44 Eksciplo k pedunklo permikroskope J+ (nigre bluaj). Talo P-, K-, C-.

55 Pedunklo verdete aŭ grizete bruna, 0,3-0,6 mm longa; kapo (0,1-0,3 mm) preskaŭ cilindra, bruna, senprujnuma. Sporoj (11-14 x 5-7 μ m) ĉesepte distingeble maldikiĝintaj, kun supraĵo preskaŭ glata (apenaŭ fendeta). Talo tute ensubstrata, ne aŭ ne tre distingebla. — Montaroj k malvarmaj regionoj. Surŝela, plejofte sur branĉetoj de *Alnus incana* — 8. *C. adaequatum* Nyl.

5 Pedunklo nigra aŭ tre malhele ruĝbruna, 0,7-2 mm longa; kapo (0,3-0,5 mm) turboforma, preskaŭ ĉiam ete prujnuma. Sporoj (9-11 x 4-5 μ m) ĉesepte ne maldikiĝintaj, kun supraĵo rete fendeta. Talo grandparte ensubstrata sed parte

fajne granula, bluete, verdete aŭ flavete griza. — Montaroj k malvarmaj regionoj. — Sin. *C. schaereri* De Not. — **9. *C. subquercinum*** Asah.

4 Eksciplo k pedunklo permikroskope J- aŭ preskaŭ [supraja pedunkloparto maks. ete J+ (blueta)].

55 Talo C+ k KC+ (oranĝa), K+ (flavaĉa), granula, flavete verda. Pedunklo (0,4-0,7 mm longa) nigra, senprujnuma; kapo (0,3-0,7 mm larĝa) nigra, subaparte iafoje ete prujnuma, lento- aŭ turbo-forma. Sporoj (10-13 x 4-7 µm) kun supraĵo neegala k fendega. — Regionoj milde varmaj-humidaj —

10. *C. hyperelloides* Nyl.

55 Talo C-, KC-.

66 Talo P+ k K+, fajne granula, griza.

77 Talo P+ (flava), K+ (flava, poste ruĝa). Apotecioj tute nigraj, malbrilaj, kun pedunklo 0,6-1 mm longa k kapo (0,3-0,5 mm) ± globa, subaparte preskaŭ ĉiam prujnuma. Sporoj (9-11 x 4-5 µm) ĉesepte ne maldikiĝintaj, kun supraĵo spirale ripa. — Tre disvastiĝinta. Precipe sur *Quercus* —

11. *C. quercinum* Pers.

7 Talo P+ k K+ (oranĝa). Apotecia kapo bruna, subaparte senprujnuma.

—→ **12. *C. salicinum*** (maloftaj formoj kun talo sursubstrata)

6 Talo P-, K- aŭ (iafoje ĉe *C. parvum*) ete P+ k ete K+ (flaveta).

77 Sporoj plejmulte ne pli ol 11 µm longaj.

88 Apotecioj kun kapo (0,5-0,7 mm) subaparte bruna k senprujnuma, ± globa, k pedunklo (0,8-1,5 mm longa) nigra, ĉesupre iafoje bruna. Sporoj (7-13 x 3-6 µm) ĉesepte ne aŭ apenaŭ maldikiĝintaj, kun supraĵo spirale ripa k lokloke fendeta. Talo preskaŭ ĉiam ensubstrata k ± nedistingebla. — Sin. *C. trachelinum* (Ach.) Ach., *C. sphaerocephalum* Ach.. — Tre disvastiĝinta kvankam malofta en Mediteranea Regiono —

12. *C. salicinum* Pers.

8 Apotecioj kun kapo (0,1-0,3 mm) nigra, subaparte iafoje ete prujnuma, ± lentoforma, k pedunklo (0,3-0,7 mm longa) nigra, ± brila. Sporoj (8-11 x 3-5 µm) ĉesepte maldikiĝintaj, kun supraĵo rete fendeta, laŭaspekte veruk-areola. Talo ensubstrata, ne aŭ ne tre distingebla, aŭ sursubstrata, granula, griza (ofte verdete). — Francio, Skotio, Skandinavio. Sur koniferoj —

13. *C. parvum* Tibell

7 Sporoj plejmulte aŭ ĉiuj almenaŭ 11 µm longaj.

88 Apotecioj almenaŭ ĉerande prujnumetaj. Sporoj (8-14 x 3-7 µm) ĉesepte ne maldikiĝintaj, kun supraĵo neregule sulka-fendega. Pedunklo (0,4-1 mm longa) nigra; kapo (0,2-0,3 mm) turboforma. Talo ensubstrata, ± nedistingebla. — Mez- k N-Eŭropo —

14. *C. glaucellum* Ach.

8 Apotecioj senprujnumaj. Sporoj ĉesepte ete maldikiĝintaj.

999 Sporoj (11-14 x 6-8 µm) kun supraĵo neegala k neregule fendeta. Pedunklo nigra, 0,6-1,2 mm longa; kapo (0,2-0,4 mm) globa. Talo ensubstrata, ne aŭ ne tre distingebla. — Montaroj k malvarmaj regionoj. Lignoloĝa —

15. *C. denigratum* (Vain.) Tibell

99 Sporoj (12-15 x 5-7 µm) kun supraĵo fajne veruk-areola. Apotecioj nigraj aŭ brunaj, kun pedunklo 0,4-1 mm longa k kapo (0,3-0,5 mm) preskaŭ cilindra. Talo ensubstrata, ne aŭ ne tre distingebla. — Mezvarmaj k milde malvarmaj regionoj. Lignoloĝa, nitrumeja —

16. *C. abietinum* Pers.

- 9 Sporoj (12-14 x 6-7 μ m) kun supraĵo ornamita de spiralaj sulkoj ofte lokloke interrompitaj de neregulaj fendetoj. Pedunklo nigra, tre maldika, 1-2 mm longa; kapo (0,2-0,3 mm) $\pm$ globa, subaparte ĝenerale bruna. Talo plejofte bone videbla, granula, tre verda (iafoje tre maldika k $\pm$ nedistingebla), sorala [f. *viride*] aŭ ne [f. *sessile* (Cromb.) Vain.]. — Tre disvastiĝinta ekster Mediteranea Regiono. — Sin. *C. hyperellum* (Ach.) Ach. — **17. *C. viride* Pers.**

Caloplaca

- p. 227, l. 10. Anstataŭ "*LEPROLACA*", legi "*LEPROPLACA*".
- p. 228, n-ro 7. *C. variabilis* (Pers.) Müll. Arg.. Aldoni : Tre disvastiĝinta, $\pm$ nitrumesja, sur petroj kalkaj aŭ ne.
- p. 229, n-ro 9. *C. concinerascens* ssp. c.. Aldoni : "Alpoj k Pireneoj".
- p. 230, n-ro 15. Anstataŭ "*annularis*", legi "*anularis*" k modifi la disvastiĝon jene : Altaĵ montaroj de Mezeŭropo.
- p. 239, n-ro 35. Anstataŭ "Afina al 62", legi "Afina al 64".
- p. 240, fig. 162. Anstataŭ "*tegularis*", legi "*obliterata*".
- p. 244, § 11. Modifi jene :
 22 = 222 ... —————→ ***Fulgensia*** (6. *F. schistidii*)
- 2 Talo blanketa aŭ grizeta, K-.
- 33 Sporoj (22-31 x 5-7 μ m) $\pm$ daŭre sen septo nek dikajo. Talo grizeta... Apotecioj (0,2-0,6 mm)... **41. *C. nivalis*** (Körb.) Th. Fr.
- 3 Sporoj (15-19 x 7-9 μ m) kun dikajo 2-3 μ m longa. Talo $\pm$ nedistingebla. Apotecioj (0,2-0,5 mm).
- 44 Apotecioj kun randaĵo daŭra, nigreta, elstara, k disko malhele bruna, ebena. Talo malhele bluetgriza. — Skandinavio — **42a. *C. tornoensis*** H. Magn.
- 4 Apotecioj kun randaĵo maldaŭra, $\pm$ samkolora al la disko flavete, ruĝete aŭ grizete bruna, fruevolue konvekasa. Talo blanketa. — Montaroj k malvarmaj regionoj. Sur acida humo — **42b. *C. livida*** (Hepp.) Jatta
- p. 255-256, n-ro 79. *C. herminica* Samp.. Modifi jene (POELT k KALB, 1985) :
- 2 Talo skvameta, ... Skvametoj (1-4 mm) helege brunaj aŭ blanketaj, oftete lobetaj, ... Apotecioj (0,2-1,5 mm)... — Portugalio, S-Francio, Centra Montaro k Vogezoj. Monta etaĝo; nekalkesja, sur muskoj (i.a. *Grimmia*), pli malofte surpetra inter likenoj (i.a. *Candelariella vitellina*), ja ne parazita. — Sin. *C. herminica* Samp. — **79. *C. congregiens*** (Nyl.) Zahlbr. non auct.
- 4 linioj poste,
 Anstataŭ : "4444 ... kelkaj brunaj skvametoj —————→ **79. *C. herminica***",
 legi : "4444 ... kelkaj hel(eg)e brunaj skvametoj —————→ **79. *C. congregiens***"
- n-ro 81. *C. congregiens* Steiner. Modifi jene :
- 44 Talo $\pm$... Apotecioj (0,2-1,3 mm) ... Tre afina al 79. *C. congregiens*... Specife parazita al *Candelariella vitellina*. — Sin. *C. consociata* Steiner, *C. congregiens* auct. non (Nyl.) Zahlbr. — **81. *C. grimmiae*** (Nyl.) Oliv.
- p. 256, § 1. Post "petroloĝaj", aldoni : "[Se apotecioj zeorecaj (kun propra k tala randaĵoj) —————→ **98b. *C. submergenda***]"
- p. 259, § 22. Modifi jene : Apotecioj flavaj aŭ oranĝaj, iafoje $\pm$ nigriĝintaj.
- p. 260, § 4, 5. Post "Sporoj", aldoni "ĝenerale".
- §8. Modifi jene :

8 Humidejaj k eĉ maldaŭre subakvaj. Talo ... hele griza.

99 Sporoj (12-17 x 6-9 μ m) kun dikaĵo 4-8 μ m longa. Apotecioj (0,4-0,8 mm) kun disko $\pm$ ruĝete flava, ebena, kun propra randaĵo dika, integra, elstara, daŭra, oranĝe flava, sen tala randaĵo... **98a. *C. atroflava*** (Turn.) Mong.

9 Sporoj (8-12 x 4-6 μ m) kun dikaĵo 2,5-4 μ m longa. Apotecioj (0,3-1 mm) kun disko okreta ĝis nigrete okra, propra randaĵo flava, k maldika tala randaĵo ne elstara, daŭra, proks. samkolora al la talo. — Francio (Limoĝio). Nedaŭre subakva — **98b. *C. submergenda*** (Nyl.) Oliv.

Candelariella

p. 266, n-ro 2. ***C. medians*** (Nyl.) A.L. Sm. Aldoni : f. ***steepholmensis*** O. Gilbert, el Anglio, diferencas de la tipo pro talo citrone verda.

Post § 3333. Modifi jene :

44 Talo sensorala, ofte ne tre videbla, el granuloj (0,2-0,4 mm) ne pulvorecaj, ove flava.

55 Talo ne tre videbla, el granuloj disaj, malmultaj aŭ iafoje malestaj, aŭ iĝinta verdete cindrogriza. Apotecioj (0,2-2 mm) ove flavaj sed ofte iĝintaj brune verdaj... **4a. *C. aurella*** (Hoffm.) Zahlbr.

5 Talo bone videbla, el granuloj disaj aŭ ariĝintaj en amasoj $\pm$ koraloidaj. Apotecioj (0,2-1 mm) daŭre ove flavaj, kun randaĵo iom pli helkolora ol la disko, krenela, finevolue nur el disaj granuloj (0,1-0,2 mm) $\pm$ pulvorecaj. Sporoj 12-17 x 5-6 μ m. — N-Eŭropo. Sur-defalaja k -ŝtona; $\pm$ humideja —

4b. *C. dispersa* (Räs.) Hakul.

Catillaria

p. 271, l. 4 de la unua §. Anstataŭ "protokoida", legi : "protokokoida".

p. 273, § 222, 33. Anstataŭ "(*L. aemulans*)", legi : "(22. *L. aemulans*)".

p. 275, § 333, 44, 5. Modifi jene :

66 Sporoj (6-9 x 2-4 μ m) 12-16-opaj. — Nelikeniĝinta fungo parazita al *Anaptychia ciliaris* — **3a. *Catillaria mediterranea*** Hafellner

6 Sporoj 8-opaj. Likenoj.

77 = 66 ...

3b. *Catillaria lenticularis*

7 = 6 ...

4. *Catillaria subviridis*

p. 279, n-ro 29. Modifi jene : . — Sin. ... *C. bouteillei* (Desmaz.) Zahlbr. —

29. *Fellhanera bouteillei* (Desmaz.) Vězda

Cetraria

p. 286, § 2. Modifi la determinilon jene :

2 Talo kun ekstera flanko... 0,5-10 cm alta... pseŭdocifeloj blankaj, makuloformaj.

33 Talo 0,5-1 cm alta, kun rimenoj tre mallarĝaj [(0,2)0,5-1 mm], dense kusenetforma, disdue aŭ neregule multebanĉa, K-, P-, C-, KC-. Pseŭdocifeloj malgrandaj, nur per lupeo videblaj. Apotecioj (0,2-0,8 mm) esceptokazaj. — Finnio, Skandinavio k Francaj Pireneoj. — Sin. *Coelocaulon* o. (Ach.) R.H. Howe — **12. *Cetraria odontella*** (Ach.) Ach.

3 Talo 2-10 cm alta, ne dense kusenetforma, kun rimenoj almenaŭ 1 mm larĝaj. Apotecioj almenaŭ 2 mm diametraj.

Apotecioj almenaŭ 2 mm diametraj.

- 44 Talmedolo k pseŭdocifeloj (cetere ne multaj) C+ k KC+ (karmine ruĝaj), P-, J-, kun girofora k hiasca acidoj; rimenoj kutime ne tre kanalfarmaj, kun rando sen-aŭ malmulte-dorneta. Apotecioj (2-17 mm) oftetaĵ, malhele ĝis hele brunaj. — Arktaĵ regionoj, Finnio, Skandinavio, Skotio, Slovakio (Tatroj) k Aŭstrio. Sur acidaj k humidaj grundoj, esceptokaze sur tigoj de arbustoj —

13. *C. delisei* (Bory ex Schaer.) Nyl.

- 4 Talmedolo k pseŭdocifeloj C-, KC- sed J+ (indigaj) k ofte P+ (ruĝaj). Talrimenoj kun rando internen volviĝa, ofte kun cilioj kutime rigidaj k dikaj (dornetoj, ĝenerale malhelkoloraj), malofte kun soraloj (sen taksonomia valoro laŭ KÄRNEFELT, 1979).

- 55 Talmedolo k pseŭdocifeloj P+ (ruĝaj), kutime K+ (flavaj ĝis ruĝaj), kun fumarprotocetrara acido. Dornetoj 0,1-1 mm longaj. Medolaj hifoj 2,5-3,5 mm diametraĵ. Apotecioj 2-20 mm diametraĵ. — Mez- k malvarmaj regionoj. Sur-grunda k -huma —

14. *C. islandica* (L.) Ach.

- αα Talrimenoj (2)4-10(45) mm larĝaj, kanalfarmaj aŭ (ĉefe la plej larĝaj partoj) ne, kutime distingeble randaĵaj, kun pseŭdocifeloj bone videblaj, multaj (ĉiam sur la interna flanko — kie ili estas lini-aranĝaj laŭlonge de la rando —, preskaŭ ĉiam sur la ekstera flanko). Talsupraĵo glata aŭ ete malglata (pro fajnaj ripoj kaŭ sulkoj). — Tre disvastiĝinta k ofta, escepte de tro sekaj regionoj. — Sin. v. *platyna* (Ach.) Ach. k v. *sorediata* (Schaer.) Arnold —

ssp. islandica

- α Talrimenoj 1-5(20) mm larĝaj, grandparte kanalfarmaj, lokloke eĉ preskaŭ tuboformaj, senrandaĵaj, kun pseŭdocifeloj malgrandaj, ne tre videblaj, neniam multaj, ĝenerale malestaj ĉe la rando de la interna talflanko. Talsupraĵo kutime malglata pro foveetoj kaŭ ripoj, neniam tute glata. — N-Eŭropo, Skotio, N-Anglio, Nederlando, Francio (Savojo) k Aŭstrio (Stirio). Malvarme atlantik-klimata —

ssp. crispiformis (Räs.) Kärnef.

- 5 Talmedolo k pseŭdocifeloj P-.

- 66 Talrimenoj 1-5(20) mm larĝaj, kun supraĵo sulka kaŭ foveeta; pseŭdocifeloj ne tre videblaj (malestaj aŭ maloftaj k malgrandaj sur la interna flanko; malgrandaj k neniam multaj sur la ekstera flanko).

—→ 13. *C. islandica* *ssp. crispiformis* [maloftaj individu(ar)oj P-]

- 6 Talrimenoj kun supraĵo glata aŭ ete sulka. Pseŭdocifeloj abundaj k bone videblaj (almenaŭ ĉerande de la interna talflanko, kie ili estas lini-aranĝaj).

- 77 Talrimenoj (2)4-10(45) mm larĝaj, kanalfarmaj aŭ (ĉefe la plej larĝaj partoj) ne; ekstera flanko preskaŭ ĉiam kun pseŭdocifeloj diversaj laŭ nombro, formo k dimensioj. Dornetoj 0,1-1 mm longaj. Medolaj hifoj 2,5-3,5 mm diametraĵ. Apotecioj 2-20 mm diametraĵ. Hipotecio 20-30 μm alta. Sporoj 6-10 x 4-5 μm.

—→ 13. *C. islandica* *ssp. islandica* [maloftaj individu(ar)oj P-]

- 7 Talrimenoj (0,5)1-2(10) mm larĝaj, ege kanalfarmaj (randoj ofte kuntuŝaj); ekstera flanko senpseŭdocifela (escepte iafte de la plej larĝaj partoj). Dornetoj 0,1-0,5(1) mm longaj. Medolaj hifoj 3-5 μm diametraĵ. Apotecioj 2-5(10) mm diametraĵ. Hipotecio 15-20 μm alta. Sporoj 7-9 x 2,5-4 μm. — Montaroj k malvarmaj regionoj. Sur acidaj aŭ humaj grundoj. — Sin. *C. tenuifolia* (Retz.) Howe jr., *C. crispa* (Ach.) Nyl. — 15. *C. ericetorum* Opiz

***Chaenothecopsis* Vain.**

kun ***Phaeocalicium* A. Schmidt** k ***Mycocalicium* Vain.** (p. 228)

Tiuj tri genroj (v. ankaŭ la enkondukon al *Calicium* en ĉi tiu suplemento), tre interafinaj, diferencas inter si nur pro askosupro kun parieto :

- ete dikiĝinta ĉe *Mycocalicium*,
- tre dikiĝinta, sen okulusa ĉambro ĉe *Phaeocalicium*,
- tre dikiĝinta, kun okulusa ĉambro (speco de laŭaksa kanaletoj) ĉe *Chaenothecopsis* (inkl. *Strongyleuma* Vain., kiu diferencas de *Chaenothecopsis* nur pro detaloj de la pedunklo-strukturo).

11 Sporoj 0-septaj.

- 22** Apotecioj permikroskope K+ (verdaj), kun kapo nigra, globa, maks. 0,5 mm diametra, k pedunklo maldika, blanketa, 0,8-2 mm longa. Sporoj 6-9 x 3-4 µm. — Montaroj k malvarmaj regionoj. Sur koniferoj, iafoj alkreskanta *Chaenotheca chrysocephala*-n — **1. *Chaenothecopsis viridialba* (Krempelh.) A. Schmidt.**

22 Apotecioj K+ (ruĝaj), kun kapo lentoforma. — Tre interafinaj —

- 33** Pedunklo nigra, 0,6-1 mm longa; kapo 0,2-0,6 mm diametra. Sporoj 5-11 x 2-4 µm. — Karpatoj. Sur arboj — **2. *Chaenothecopsis gracilis* Nádv.**

- 3** Pedunklo bruneta aŭ nigreta, 0,3-0,9 mm longa; kapo 0,2-0,4 mm diametra. Sporoj 5-10 x 2-3 µm. — Mez- k N-Eŭropo. Precipe sur senrezinaj arboj, ofte alkreskanta likenojn (ĉefe *Arthonia*) — **3. *Chaenothecopsis rubescens* Vain.**

2 Apotecioj K-.

- 33** Likenloĝaj, sur krustecaj taloj plejofte pulvorecaj. Apotecia kapo nigra. Sporoj 6-12 x 3-4 µm (eksa genro *Strongyleuma*).

- 44** Apotecioj kun pedunklo nula aŭ tre mallonga k kapo ± globa.

- 55** Kapo 0,1-0,4 mm diametra. — Alpoj k Karpatoj. Sur ŝelloĝaj likenoj —

4. *Chaenothecopsis koerberi* (Nádv.) Tibell

- 5** Kapo maks. 0,1 mm diametra. — Mezeŭropo. Sur petroloĝaj-nekalkeaj likenoj — Eble samspecia al 6. *Chaenothecopsis exertum* —

5. "*Strongyleuma*" *parvicum* (Ach.) Vain.

- 4** Apotecioj kun pedunklo 0,2-0,5 mm longa k kapo globa aŭ duongloba, 0,1-0,3 mm diametra. — Mez- k N-Eŭropo. Sur petroloĝaj-nekalkeaj likenoj. — Tre interafinaj k probable samspeciaj —

- 555** Pedunklo tute nigr(et)a.

6. *Chaenothecopsis exertum* (Nyl.) Tibell

- 55** Pedunklo ĉebaze pli helkolora.

7. "*Strongyleuma*" *hemileucum* Vain.

- 5** Pedunklo tute blanketa.

8. "*Strongyleuma*" *albipes* Vain.

3 Ligno- aŭ ŝel-loĝaj.

- 44** Sur maldikaj branĉetoj de arboj.

- 555** Sur *Alnus viridis*, en Alpoj k Antaŭalpoj. Apotecioj kun pedunklo 0,2-0,3 mm longa, bruneta, k kapo 0,2 mm diametra, konkava, nigra. Sporoj 9-15 x 4-5 µm. **9. *Phaeocalicium compressulum* (Nyl. ex Szat.) A. Schmidt**

- 55** Sur *Populus tremula*, en Finnio k Britio. Apotecioj tute nigraj, kun pedunklo 0,4-1,2 mm longa k kapo 0,2-0,4 mm diametra, lento- aŭ turbo-forma. Sporoj 12-17 x 5-7 µm. **10. *Phaeocalicium praecedens* (Nyl.) A. Schmidt**

- 5** Sur *Fraxinus ornus*, en regionoj sufiĉe varmaj-humidaj.

- 66 Apotecioj kun pedunklo 0,2 mm longa, bruneta, ĉebaze pli helkolora, k kapo malpli ol 0,1 mm diametra, konkava, nigra. Sporoj 8-14 x 4-6 μ m.
11. *Mycocalicium ornicolum* (Steiner) Nád. v.
- 6 Apotecioj kun pedunklo 0,5 mm longa, tute bruneta, k kapo 0,1-0,3 mm diametra, globa, nigra. Sporoj 13-19 x 7-9 μ m.
12. *Microcalicium mildeanum* (Hepp) Nád. v.
- 4 Sur trunkoj, branĉoj, stumpoj aŭ ligno (putranta aŭ ne).
55 Pedunklo tute blanketa aŭ apenaŭ bruneta.
 66 Pedunklo tre maldika (malpli ol 0,1 mm) k mallonga (0,2-0,3 mm); kapo almenaŭ 0,2 mm diametra, turboforma. Sporoj 9-13 x 3-7 μ m. — N-Eŭropo. Selloĝa, preskaŭ nur sur *Betula* —
13. *Mycocalicium betulinum* (Nyl.) Vain.
- 6 Pedunklo almenaŭ 0,1 mm dika; kapo lentoforma. — Lignoloĝaj, ofte sur putranta ligno —
 77 Pedunklo 0,2-0,5 mm longa; kapo 0,1-0,2 mm dika, nigra. Sporoj 4-8 x 2-3 μ m. — Mez- k N-Eŭropo —
14. *Chaenothecopsis pusiolum* (Ach.) Vain.
- 7 Pedunklo ĝis 2 mm longa. Sporoj 5-10 x 2-4 μ m. — N-Eŭropo —
15. *Mycocalicium pallescens* (Nyl.) Vain.
- 5 Pedunklo nigra krom la bazo iafaje bruneta.
 666 Pedunklo 1-2 mm longa; kapo 0,4-0,7 mm diametra, klabo- aŭ turboforma. Sporoj 5-8 x 2-4 μ m. — Mez- k N-Eŭropo; S-Hispanio. Preskaŭ nur lignoloĝa. — Sin. *Calicium subtile* Pers. ex Steud. —
16. *Mycocalicium parietinum* (Ach. ex Schaer.) Hawksw.
- 66 Pedunklo 0,2-0,5 mm longa; kapo 0,1-0,3 mm diametra, globa aŭ lentoforma.
 77 Sporoj 4-8 x 2-4 μ m. Pedunklobazo ofte bruneta — Montaroj k regionoj malvarmaj aŭ milde malvarmaj. Nur lignoloĝa —
17. *Mycocalicium minutellum* (Ach.) Nád. v.
- 7 Sporoj 5-10 x 3-4 μ m. — S de Mezeŭropo. Nur surŝela, precipe sur *Quercus* —
18. *Chaenothecopsis alboatra* (Flörke) Nád. v.
- 6 Pedunklo 0,3-0,9 mm longa; kapo 0,1-0,3 mm diametra, lentoforma.
 77 Sporoj 6-9 x 3-4 μ m. — Karpatoj. Nur surŝela, sur *Fagus* —
19. *Chaenothecopsis faginea* Nád. v.
- 7 Sporoj 5-9 x 2-4 μ m. — N-Eŭropo. Preskaŭ nur sur-ŝela k -konifera —
20. *Chaenothecopsis nana* Tibell
- 1 Sporoj 1-septaj.
22 Likenloĝaj.
333 Sur grundoloĝaj-nekalkeaj likenoj (skvametoj de ruĝapoteciaj *Cladonia*). Apotecioj K-, N-, kun pedunklo 0,2-0,5 mm longa, hele grizetbruna ĝis nigra, k kapo (0,2-0,3 mm) lentoforma, nigra. Sporoj 6-10 x 2-4 μ m. — Mez- k N-Eŭropo —
21. *Chaenothecopsis parasitaster* (Bagl. et Car.) Hawksw.
- 33** Sur petroloĝaj-nekalkeaj likenoj krustecaj, subkorbekaj. — Mez- k N-Eŭropo —
44 Sur talo de *Chaenotheca furfuracea*. Apotecioj tre malgrandaj, kun pedunklo hele bruna ĝis nigra k kapo nigra, globa aŭ turboforma. Sporoj 4-10 x 2-4 μ m. —
 —————> *Calicium* (2. "*Caliciella*" *parasitica*)

- 4 Sur senfruktaj, leprecaj taloj. Apotecioj nigraj, kun pedunklo malpli ol 0,3 mm longa k kapo (0,2-0,3 mm) konusa aŭ globa. Sporoj 7-14 x 2-7 μ m. — Mez- k N-Eŭropo — **23. "Calicium" subparoicum** Nyl.
- 3 Sur ŝel- aŭ ligno-loĝaj likenoj krustecaj (iafoje ankaŭ sur ŝelloĝaj algokolonioj).
- 44 Pedunklo nula aŭ tre mallonga. Sporoj 8-11 x 2-5 μ m. — Insulo Jerzejo (Jersey). Sur senfrukta talo blanketa, sur *Quercus*. —
—→ **Calicium** (4. "*Calicium*" *retinens*)
- 4 Pedunklo 0,2-1 mm longa.
- 55 Apotecioj permikroskope K+ [observu dispremajon en K].
- 66 Apotecioj N+ (ruĝe brunaj), K+ (flavetaj), kun pedunklo 0,2-0,7 mm longa, nigra aŭ nigre bruna, k kapo (0,1-0,4 mm) lentoforma, subaparte malhele ruĝbruna. Sporoj 6-12 x 2-4 μ m. — Tuta Eŭropo. Sur multaj likenspecioj, i.a. *Calicium salicinum*, aŭ sur algokolonioj —
25. Chaenothecopsis vainioana (Nádv.) Tibell
- 6 Apotecioj N-, K+ (verdaj), kun pedunklo 0,5-1 mm longa k kapo (0,2-0,3 mm) nigra, globa, lentoforma aŭ pli malofte cilindra. — Montaroj k malvarmaj regionoj —
- 77 Pedunklo bruna. Sporoj 4-8 x 2-3 μ m. — Sur ligno de koniferoj; iafoje alkreskas diversspeciajn *Chaenotheca* —
26. Chaenothecopsis viridireagens (Nádv.) A. Schmidt
- 7 Pedunklo nigra. Sporoj 6-9 x 2-3 μ m. — Sur talo de *Chaenotheca chryscephala* — **27. Chaenothecopsis consociata** (Nádv.) A. Schmidt
- 5 Apotecioj K- sed kun pedunklo-supraĵo N+ (ruĝa), tute nigraj, kun pedunklo 0,5-1 mm longa k kapo (0,1-0,2 mm) lentoforma. Sporoj 5-7 x 2-3 μ m. — Britio k Skandinavio. Sur talo, pli malofte pedunklo, de *Chaenothecopsis trichialis* — **28. Chaenothecopsis epithallina** Tibell
- 2 Ne likenloĝaj.
- 33 Apotecioj dense k gazonece ariĝintaj, kun pedunkloj branĉaj, iafoje inter si anastomozaĵaj, 2-4 mm longaj, nigraj, k kapoj (0,1-0,4 mm) nigraj, $\pm$ globaj. Sporoj 9-14 x 3-5 μ m. — Britaj Insuloj. Sur malbone stata poliporo k sur putranta ŝelo de *Taxus* — **29. Chaenothecopsis caespitosa** (Phillips) Hawksw.
- 3 Apotecioj ne tiel ariĝintaj, kun pedunkloj nek branĉaj nek inter si anastomozaĵaj.
- 4444 Sur malbone stataj poliporoj. Apotecioj tute nigraj, kun pedunklo 0,1-0,4 mm longa k kapo malpli ol 0,1 mm diametra. Sporoj (10-20 x 3-4 μ m) kun septo ofte ne klara. — **30. Phaeocalicium polyporaeum** (Nyl.) Tibell
- 4444 Sur surŝelaj algokolonioj. Apotecioj permikroskope N+ (ruĝaj), K+ (flavete brunaj). —→ **25. Chaenothecopsis vainioana**
- 444 Sur *Poaceae* (= graminacoj). Apotecioj nigraj, kun pedunklo tre mallonga (0,1 mm) k kapo (0,2-0,6 mm) $\pm$ globa aŭ plata. Sporoj 6-8 x 3 μ m. —→ **Calicium** (1. *C. culmigenum*)
- 44 Sur maldikaj branĉetoj de *Populus*, plejofte mortaj. Pedunklo 0,2-0,5 mm longa, helbrunete aŭ nigrete griza; kapo (0,1-0,3 mm) globa. Sporoj (10-14 x 4-6 μ m) iafoje 0-septaj. — Mez- k N-Eŭropo —
31. Phaeocalicium populneum (Brond. ex Duby) A. Schmidt
- 4 Sur trunkoj, branĉoj, stumpoj aŭ ligno (putranta aŭ ne).
- 55 Apotecioj permikroskope K+, kun pedunklo 0,5-1 mm longa, bruna, k kapo (0,2-0,3 mm) nigra, globa aŭ lentoforma. Sporoj 4-8 x 2-3 μ m. — Montaroj k malvarmaj regionoj. Sur ligno de koniferoj —

- 66 Apotecioj K+ (ruĝaj). 32. *Chaenothecopsis lignicola* (Nádv.) A. Schmidt
 6 Apotecioj K+ (verdaj). —→ 26. *Chaenothecopsis viridireagens*
 5 Apotecioj K- aŭ (34. *C. debilis*) kun ruĝaj partoj ete K+ (pli intense ruĝaj), kun kapo (0,3-0,5 mm) lentoforma, nigra.
 66 Apotecioj permikroskope grandparte N+.
 77 Apotecioj N+ (ruĝe brunaj), kun disko ete prujnuma k pedunklo malhele aŭ nigre bruna, 0,8-1,5 mm longa. Sporoj 7-9 x 2-3 µm. — N-Eŭropo. Lignoloĝa — 33. *Chaenothecopsis fennica* (Laurila) Tibell
 7 Apotecioj N+ (purpuraj), kun disko senprujnuma k pedunklo nigra, 0,6-1,2 mm longa. Sporoj (5-8 x 2-3 µm). — Francio (apud Poitiers), Anglio k Skandinavio. Lignoloĝa, ĉefe sur koniferoj — 34. *Chaenothecopsis debilis* (Turn. et Borr.) Tibell
 6 Apotecioj tute N-, senprujnumaj, kun pedunklo hele brunetgriza ĝis nigra, 0,5-0,9 mm longa. Sporoj 4-9 x 2-3 µm. — Mez- k N-Eŭropo. Ligno- k ŝel-loĝa. — Sin. *C. subpusilla* (Vain.) Tibell — 35. *Chaenothecopsis pusilla* (Flörke) A. Schmidt
 p. 289, antaŭ *Chrysopsora*, aldoni :
Chromatochlamys Trev. —→ *Microglaena*

Cladonia

- p. 327, n-ro 69. *Cladonia brevis* ekzistas ankaŭ en Francio (Vogezoj k Centra Montaro [= massif Central]).
 n-ro 70. *C. callosa* Delise ex Harm. Modifi la disvastiĝon jene : U-Skotio, SU-Norvegio, Centra Francio, Nederlando k U-Germanio.

Coelocaulon Link.

kun *Bryocaulon* Kärnefelt (p. 338)

KÄRNEFELT (1986) apartigas de *Coelocaulon* la genron *Bryocaulon* (kun ĉefa specio *B. divergens*) k ekskludas de ĝi *Coelocaulon odontella*, kiu fakte apartenas al la bruntalaj *Cetraria* (v. pli supren). Tiuj ĉi genroj k *Cornicularia* distingeblas jene :

- AA** Surpetra. Talo nigra, nigreta aŭ nigrete bruna, kartilageca, brila, tre adhera al la substrato, kun branĉoj ± plataj, sen talaj elstarajoj (i.a. sen dornetoj), kun rudimenta unuavica talo folieca aŭ skvameta. Piknidioj entalaj ĝis ± elstaraj. Apotecioj ĉefinaj aŭ apudfinaj. Sen likenaj substancoj. *Cornicularia*
A Sur-grundaj aŭ (malofte) -ŝelaj. Talo bruna, griza aŭ nigrete verda, ne aŭ ne tre adhera al la substrato (per malgranda fiksilo diskoforma). Kun likenaj substancoj.
BB Talbranĉoj kun elstarajoj (dornetoj) entenantaj po unu ĉefinan piknidion.
CC Talbranĉoj plataj aŭ kanalfarmaj. Medolaj hifoj ± densaj (sekve medolo malkava). Apotecioj ĉerande de la interna (aŭ supra) talflanko. *Bruntalaj Cetraria*
C Talbranĉoj ± rond- aŭ angul-sekcaĵaj. Medolaj hifoj ± maldensaj (sekve medolo, almenaŭ parte, ofte kava). Apotecioj ĉe- aŭ apudfinaj. *Coelocaulon*
B Talbranĉoj sen elstarajoj (i.a. sen dornetoj), ± rond- aŭ angul-sekcaĵaj. Piknidioj entalaj. Apotecioj lateraj. *Bryocaulon*

Determinilo pri la specioj de *Coelocaulon* s.l. :

- 11** Medolo C+ k KC+ (karmine ruĝa), kun oliveta acido. Talo ± stara, ruĝete ĝis malhele bruna, brila, grandparte glata (ialoke foveeta), tre rompiĝema, 2-10 cm alta, disdue multebranĉa, kun finbranĉoj pintaj; ĉiuj talpartoj rondsekcaj (1-2 mm diametroj), punktitaj de pseŭdocifeloj (ĉ. 0,3 x 0,1 mm) longformaj, blanketaj. Apotecioj tre malofte ĉeestaj. — Arktaĵ regionoj, Skandinavio k N-Skotio. — Sin. *Coelocaulon d.* (Ach.) R.H. Howe — **1. *Bryocaulon divergens*** (Ach.) Kärnef.
- 1** Medolo C-, KC-. Talo bruna aŭ malhele bruna.
- 22** Talbranĉoj plat- k ± kanal-sekcaj (escepte iafoj de la finbranĉoj). Medolo neniam kava. Pseŭdocifeloj malgrandaj, nur per lupeo videblaj. Apotecioj esceptokazaj. — **→ *Cetraria odontella*** (Ach.) Ach.
- 2** Talbranĉoj rond- aŭ angul-sekcaj, maks. lokloke plataj. Medolaj hifoj ± maldensaj k sekve medolo parte ofte kava.
- 33** Talo ete K+ k ete P+ (ruĝeta), kun norstikta acido; branĉoj malbrilaj, dikaj, ofte malmultedornetaj, glataj aŭ ne (pro sulkoj kaŭ foveetoj), nek tre rigidaj nek tre rompiĝemaj. — Stepoj de S-Sovetio. Erare menciita en Hispanio far BARRENO k VASQUEZ (1982), laŭ KÄRNEFELT (1986) — **2. *C. steppae*** (Sav.) Barreno et Vasquez
- 3** Talo K-, P-, sen norstikta acido.
- 44** Sur ŝelo (de tigetoj de arbustoj, pli malofte de trunko de koniferoj), malofte sur acida humo. Apotecioj (0,3-0,6 mm) oftaj. Talo ne multebranĉa, kun ĉefaj branĉoj ĉ. 0,5-1,5 mm dikaj; branĉ-supraĵo malglata pro foveetoj kaŭ sulkoj. Pseŭdocifeloj abundaj, ĝis 0,8 mm longaj. Piknidiosporoj 4-5 x 0,5-1,5 mm. — Portugalio k U-Hispanio — **3. *C. crespoae*** Barreno et Vasquez
- 4** Sur grundo (ofte nekalka), pli malofte sur humo aŭ rokoj (difektitaj aŭ muskovritaj). — Mal- k mez-varmaj regionoj. Tre oftaj — ***C. aculeatum* s.l.**
- 55** Talbranĉoj dense dividaj, la ĉefaj ĉ. 0,5(1) mm dikaj, rond-sekcaj, pli malofte iom plataj. Branĉ-supraĵo ĝenerale glata, malofte sulka aŭ foveeta. Pseŭdocifeloj malmultaj, malgrandaj (ĉ. 0,3 x 0,1 mm), ne tre videblaj. Piknidiosporoj 5-6 x 1-1,5 mm. — Sin. *C. aculeatum* ssp. *hispidum* (Lightf.) Hawksw. nom illeg. — **4. *C. muricatum*** (Ach.) Laund.
- 5** Talbranĉoj maldensete dividaj, la ĉefaj ĉ. 1(4) mm diametroj, kun sekcaĵo iom angula k iafoj neregula. Branĉ-supraĵo ĝenerale neegala pro laŭlongaj sulkoj, elstarajoj kaŭ neregulformaj foveetoj. Pseŭdocifeloj ± abundaj, bone distingeblaj (0,2-1 x 0,1-0,4 mm). Piknidiosporoj 7-8 x 0,5-1 mm. — Sin. *C. bohemicum* (Anders.) Clauz. et Roux comb. inv., *Cetraria bohémica* Anders — **5. *C. aculeatum*** (Schreb.) Link.

Collema

- p. 342, post 18.** *C. crispum*, aldoni : **Rim. : *C. furfureolum*** Müll. Arg. [= *C. sublaeve* (Jatta) Zahlbr.], antaŭe konata nur en Azio, ekzistas ankaŭ en Italio k Grekio sur kalkaj rokoj k ŝtonaj grundoj (DEGELIUS, 1986a); ĝi diferencas de 18. *C. crispum* pro sporoj pli malgrandaj (DEGELIUS, 1974 : 81), submurecaj, apotecioj pli malgrandaj (ĝis 1 mm) k talo pli maldika, kun loboj pli entranĉaj.

Coniocybe (p. 346)

Freŝdate (TIBELL, 1984) la genro *Coniocybe* estis forigita k ĝiaj specioj disigitaj en 3 genrojn : *Chaenotheca* Th. Fr., *Cybebe* Tibell k *Sclerophora* Chev. Sekve oni ŝanĝu jenajn nomojn :

Malnovaj nomoj

Coniocybe coniophaea Norm.
Coniocybe farinacea (Chev.) Nyl.
Coniocybe furfuracea (L.) Ach.
Coniocybe gracilenta Ach.
Coniocybe gracillima Vain.
Coniocybe nivea (Hoffm.) Arnold
Coniocybe peronella (Ach.) Tibell

Korektaj nomoj

Chaenotheca coniophaea (Norm.) Tibell
Sclerophora farinacea (Chev.) Chev.
Chaenotheca furfuracea (L.) Tibell
Cybebe gracilenta (Ach.) Tibell
Chaenotheca gracillima (Vain.) Tibell
Sclerophora nivea (Hoffm.) Tibell
Sclerophora peronella (Ach.) Tibell

Oni notu, ke TIBELL ne menciis *Coniocybe sulphurea* (Retz.) Nyl.

Cyphelium

p. 348, n-ro 8. *C. marcianum* B. de Lesd., ekzistas ankaŭ en Britio.

Cystocoleus

p. 349, n-ro 1-2. *C. niger* estas nura sinonimo de *C. ebeneus*. Sekve modifi la tekston pri *Cystocoleus* jene :

Talo malhelete bruna ĝis nigra. — Sur petroj ne aŭ apenaŭ kalkaj. — Sin. *C. niger* (Huds.) Hariot, *Coenogonium germanicum* Glück —

C. ebeneus (Dillwyn) Thwaites

Endocarpon

p. 361, n-ro 10. *E. pusillum* Hedw. Anstataŭ "Sin. *E. glomelliferum* (Massal.) Trevis.", legi : "Sin. *E. glomeruliferum* (Massal.) Trevis.".

Enterographa

p. 361, n-ro 4. *E. hutschinsiae* (Leight.) Massal. ekzistas ankaŭ en S-Hispanio.

p. 362, n-ro 5. *E. crassa* (DC.) Fée ekzistas ankaŭ en Katalunio.

Hypocenomyce

p. 384, n-ro 1. *H. scalaris* (Ach.) Choisy ekzistas fakte en multaj ± humidaj regionoj.

n-ro 4. *H. stoechadiana* Abbassi Maaf et Roux, ekzistas ankaŭ en Italio (Toskanio k apud Trieste), laŭ B. COPPINS, letere, k POELT, parole.

p. 385, n-ro 8. Anstataŭ "*sophora*", legi : "*sorophora*".

Hypogymnia

p. 386, n-ro 5. *H. tubulosa* (Schaer.) Hav. Oni nepre ne konfuzu difektajn formojn de *H. tubulosa*, kun supra talflanko ± soraliĝanta, kun 6. *H. bitteri*, danke al ekologio k lokiĝo de la globaj soraloj (ĉefine de lateraj malgrandaj loboĵ ĉe *H. bitteri*, ĉefine de ĉefaj loboĵ ĉe *H. tubulosa*).

Lasallia

p. 389, n-ro 2. *L. brigantium* (Zsch.) Llano ssp. *b.* ekzistas ankaŭ en Sardinio.

Lecanactis

- p. 391, n-ro 14. *L. premnea* v. *saxicola* (Leight.) Oliv. Aldoni sinonimon : *Lecanactis plocina* auct. non (Ach.) Massal.
p. 392, n-ro 20. *L.(?) umbrina* ekzistas ankaŭ en Skotio.

Lecanora

- p. 400, § 111, 2. Modifi jene :

2 Talo senloba, sencefalodia. Apotecioj tre maloftaj aŭ esceptokazaj.

33 Surpetraj, nekalkeaj.

44 Talo areola, cindre griza, kun papiloformaj izidioj soraldonaj, ...

————→ *Mosigia* (*M. gibbosa*)

4 Talo veruk-areola, helege ĝis cindre griza (iafoje brunete), P+ (ruĝa), kun soraloj unue ĉerandaj, poste vastiĝantaj al la supra areolflanko, freŝastate hele verdetaj sed blanketiĝantaj en herbario. Apotecioj (0,2-0,4 mm) maloftegaj, tre fruevolue konveksaj k senrandaj, finevolue misformaj aŭ ĝibaj, violete grizaj ĝis nigraj, iafoje iom prujnumaj; tala randaĵo tre maldaŭra, maldika, ne elstara. Hipotalo blanketa, pli malofte blueta. Epitecio blue verdeta ĝis violete bruna. Sporoj 6-13 x 5-7 µm. — Norvegio k Aŭstrio. Altmonta k subalpa etaĝoj. Subkorbela —

1a. *Lecanora cavicola* Creveld

3 Surmuska. Talo blanka...

————→ *Ochrolechia* (*Pertusaria gemminipara*)

n-ro 2. *L. lojkaeana* Szat. ekzistas ankaŭ en Skandinavio k en la montaroj de S-Hispanio; laŭ EGEA (1985), ĝiaj sporoj estas 11-14 x 7-8 µm.

- p. 401, n-ro 4. *L. conizaeoides* Nyl. Krom la bone konata formo tute pulvorec-granula, ekzistas (DEGELIUS, 1986b) ankaŭ sensorala formo multapotecia, ĝenerale konfuzita kun 100. *L. varia*. Por la distingo inter la du likenoj, v. sub n-ro 100. *L. varia* en ĉi tiu suplemento.

n-ro 6. *L. strobilina* (Spreng.) Kieff. Modifi jene : Talo maldika, granula aŭ pulvoreca, iafoje preskaŭ areola, en herbario kovriĝanta de mikroskopaj nadloj.

- p. 402, n-ro 9. *L. umbrosa* Degel. Post "fajne granulaj", aldoni "P+ (flavetaj)".

n-ro 15. *L. handelii* Steiner. Post "Soraloj preskaŭ blankaj", aldoni : "ĝis samkoloraj al la talo". Kemio : usnea acido k zeorino (PURVIS k JAMES, 1985).

- p. 405, n-ro 28. *L. rupicola* v. *sulphurata* Clauz. et Roux, ekzistas ankaŭ en Centra Montaro (Francio), ĝis 1700 m.

n-ro 30. *L. subradiosa*. Modifi jene :

... Sin. *L. subradiosa* Nyl. —

30. *L. swartzii* (Ach.) Ach.

- p. 406, n-ro 32. *L. confusa* Almb.. Aldoni : — Eŭropo —

n-ro 36. *L. schistina* (Nyl.) Arnold. Aldoni plian sinonimon : *L. pomensis* Zahlbr.

- p. 408, n-ro 47. *L. subcarnea*. Anstataŭ "(Lijeb.)", legi "(Liljeb.)".

n-ro 48. *L. cenisia* Ach. Anstataŭ "v. *soralifera* Suza", legi "v. *soredians* Suza". Dimensioj de la sporoj de *L. cenisia* : 10-19 x 5-9 µm.

- p. 411, n-ro 65. *L. rubicunda* Bagl. ekzistas ankaŭ en S-Hispanio.

- p. 412, n-ro 67. *L. chlarotera* Nyl. Aldoni : — Inkl. *L. mygdina* Nyl. k. *L. salicifolia* H. Magn. —

- p. 415, n-ro 71. *L. fuscescens* (Sommerf.) Nyl. ekzistas ankaŭ en N-Eŭropo.

- p. 417, post n-ro 83. *L. albescens*, aldoni : [Se disko mez- aŭ malhelet-bruna
————→ 145. *L. urbana* Nyl.]

p. 423, § 3, 44. Modifi jene :

44 Talo ($\pm$ malfajne granula) k apotecia tala randaĵo intense P+.

55 Talo el granuloj pulvorecaj aŭ ne, P+ (oranĝe ruĝaj). —→ 4. *L. conizaeoides*

5 Talo el malmultaj granuloj ne pulvorecaj, P+ (flavaj), ĉirkaŭapoteciaj...

100. *L. varia* (Hoffm.) Ach.

p. 424, § 5 (post n-ro 102), post "Talo maldika, granula aŭ pulvoreca," aldoni : "iafoje preskaŭ areola".

p. 427, § 2, 33. Anstataŭ "7. *A. recedens*", legi "32. *A. recedens*".

p. 431, n-ro 140. *L. muralis* ssp. *bolcana* (Poll.) Clauz. et Roux, ekzistas ankaŭ en Centra Montaro (Francio).

§4, 55, 66. Anstataŭ "altmontejaj", legi "montaraj"

Lecidea

p. 438, § HHH, I. Anstataŭ "*Lecidea*" gr. *elata*, legi : "*Lecanora* gr. *marginata*".

p. 441, § aaa, 1. Anstataŭ "p. 446", legi "p. 445".

p. 445, n-roj 11. *L. antiloga* Stirt. k 13. *L. botryosa* (Fr.) Th. Fr. ekzistas ankaŭ en N-Eŭropo.

p. 456, n-ro 45. *Lecidea atrofulva* Sommerf. ekzistas ankaŭ en Skotio (PURVIS et JAMES, 1985). Laŭ tiuj aŭtoroj, la talo estas fakte P+ (oranĝa), K+ (flava), la soraloj (0,1-0,2 mm) malhele blugrizaj, unue krateroformaj k 1-4 opaj, poste $\pm$ kuniĝintaj. Kemio : stikta, kriptostikta k spuroj da norstikta acidoj.

p. 459, n-ro 53. *L. lactea*. SCHWAB (1986) montris, ke *L. lactea* estas samspecia al 57. *L. lapicida*. Sekve, modifi jene :

4 Hipotecio senkolora aŭ hele bruna. Talo K+ (flava aŭ ruĝa) k P+ (flava aŭ ruĝeta), malofte K- k P- (kun stikta aŭ norstikta acidoj). — Inkl. *L. lactea* (Flörke) Schaer. —

53. *L. lapicida* (Ach.) Ach.

Rim. La nomenklature de la distingitaj varioj de *L. lactea* estas modifota.

p. 461. Anstataŭ "57 *L. lapicida*", legi : " —→ 53. *L. lapicida*

p. 464, aldoni : *Lecidea inops* Th. Fr., kiu diferencas de 65. *L. polycocca* Sommerf. ĉefe pro apotecioj pli grandaj (0,5-3 mm), hipotecio brune nigra, K-, k piknidioj multaj, krateroformaj, ĉirkaŭitaj de tala ŝvelaĵo, kun piknidiosporoj bastonetformaj, 10-15 x 1 μ m. Kemio : perlatola acido en la apotecia eksciplo. — Skandinavio k Ĉeĥoslovakio. Kupreja —

p. 467, n-ro 73. HERTEL et RAMBOLD (1985) proponas inkludi *L. armeniaca* en la genro *Tephromela* : *Tephromela armeniaca* (DC.) Hertel et Rambold — Tamen, ni opinias, ke, kvankam tre afina al *Tephromela*, "*Lecidea*" *armeniaca* pli verŝajne apartenas, kun 94. "*L. aglaea*" k 96. "*L. aglaeiza*", al memstara genro.

§ 1, 2. Aldoni :

333 Apotecioj nigraj. Hipotecio senkolora. Sporoj (12-16 x 8-11 μ m) malbone kreskintaj. Apotecioj (0,2-0,3 mm) kun disko 1-umba. —→ *Mosigia* (*M. illita*)

p. 471, § 8, modifi jene :

8 Talo K-, P-. Kalkejaj.

99 Talo veruk-areola, malhele bruna, brila...

84. *L. aenaeformis* (Anzi) Jatta

9 Talo skvameta, hele ĝis malhele bruna (griza en ombraj biotopoj)...

—→ 88a. *L. fissuriseda* Poelt

n-ro 85, *L. insularis*. Modifi jene :

...Sin. ... *L. insularis* Nyl. —

85. *Rimularia insularis* (Nyl.) Hertel

p. 472, post § 5, modifi jene :

666 Talo skvameta, el skvametoj (1-3 mm) disaj aŭ grupete ariĝintaj, eben- ĝis konveks-suprajaj, kun rando ne adheza al la substrato, subenkurba; supra flanko ondoforma; suba flanko hele bruna, kun rizenaj kordonoj. Apotecioj (0,5-1,5 mm) malhele brunaj ĝis nigraj, almetaj, komencevolue ebendiskaj, kun randaĵo elstara, maturstadio konveksaj k senrandaĵaj. Epitecio mezbruna; himenio 60-75 µm alta; hipotecio mezbruna, ofte kun blue nigraj granuletoj; ekscipla kortiko malhele bruna. Sporoj 9-15(18) x 4-5 µm. — Alpoj k Skandinavio. En rok fendetoj. Subalpa k alpa etaĝoj —

88a. *L. fissuriseda* Poelt

66 Talo skvamet-veruka...

88b. *L. fuliginosa* Tayl.

p. 474, § 3, 44, l. 3a, modifi jene : ...Talo K+ (tre aŭ brunete flava), pli malofte K-.

n-ro 94. HERTEL et RAMBOLD (1985) proponas inkludi *L. aglaea* en la genro *Tephromela* : ***Tephromela aglaea*** (Sommerf.) Hertel et Rambold — Tamen, ni opinias, ke, kvankam tre afina al *Tephromela*, "*Lecidea*" *aglaea* pli verŝajne apartenas, kun 73. "*L. armeniaca*" k 96. "*L. aglaeiza*", al memstara genro.

n-ro 95. *Lecidea marginata* Schaer. Modifi la § 6 jene :

6 ... Sin. *Lecidea marginata* H. Magn. —

***Lecanora marginata* (Schaer.) Hertel et Rambold**

...α...

ssp. *elata* (Schaer.)

p. 480, § 6, 7. Post "40-80 µm alta", aldoni : " — Nekalkejoj krom mala mencio —

p. 482, n-ro 110. Post "Kalkeja", modifi jene : . — Sin. *Lecidea ultima* Th. Fr. —

110. *Cephalophysia leucospila* (Anzi) Kiliass et Scheidegger

p. 483, n-ro 113. *P. commaculans* Nyl. Modifi jene :

